

**Raporto de CED : « Ses esplorcentroj pri interlingvoj »**  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 539, 1981.12.10 & 12

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel numero 15(?) de sia kolekto Esperanto-Dokumentoj, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda lingvo-Problemo, fako de UEA konata sub la mallongigo CED, ĵus eldonis raporton pri ses esplorcentroj pri interlingvoj. Kvankam nekompleta, tiu ĉi dokumento almenaŭ koncerne la pritraktitajn instituciojn, interese spegulas la hodiaŭan situacion.

A.- La koncernan enketon entreprenis Cornelius McKown, la estro de la Bibliotekoj pri Matematiko kaj Fizikaj Sciencoj ĉe la Ŝtata Universitato de Pensilvanio, Usono.

C1.- Ĝi startis en 1976, instigita de la tiama prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kaj la manuskripto kun la rikoltitaj informoj estis jam preta en 1978, sed pro diversaj kialoj ĝi ne povis tuj eldoniĝi.

A.- Intertempe Marinko Gjivoje eldonis tre detalan raporton pri la sama temo, kiu estas multe pli kompleta. La titolo de lia 56-paĝa libro estas "Konsultlibro pri esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj". ĝi aperis en Zagreb en 1980.

Cl.- Dum la raporto de Gjivoje provas registri ĉiujn bibliotekojn kaj muzeojn, kiuj konservas arkivaĵojn pri esperanto kaj planlingvistiko, la raporto de CED nur mencias la esplorcentrojn, kiuj detale respondis al la enketilo, kiun MacKown dissendis en 1976. E1 la ok kontaktitaj bibliotekoj, kvin respondis. Ĉar intertempe aperis la raporto de Gjivoje, aldona listo estus povinta almenaŭ listigi la bibliotekojn, kiujn Gjivoje registris kaj pri kiuj la CED-dokumentoj silentas.

A.- Jen ni citas, en iom densigita formo, kion la CED-dokumentoj jam tre resume diras, pri ses esplorcentroj, kiuj posedas gravajn arkivojn koncerne ĉefe esperanton.

Cl.- En Londono la Biblioteko Montagu Butler de Brita Esperanto-Asocio havas kolekton de entute tridek mil eroj, inkluzive multajn broŝuretojn, poŝtkartojn, fotojn, ktp. Ĝi havas bonan kolekton de fruaj esperantaĵoj.

A.- En Rotterdam krom riĉa kolekto da esperanto-dokumentoj, la Biblioteko Hodler de Universala Esperanto-Asocio havas konsiderindajn kolektojn pri Volapük kaj aliaj interlingvoj. Laŭ kvanto, la ciferoj estas trimil kvincent esperanto-libroj kaj proksimume sesmil ducent kongreslibroj, instruiloj kaj libroj en aliaj lingvoj ol esperanto. Mankas cifero pri volumoj de periodaĵoj, sed la biblioteko posedas preskaŭ ĉiujn iam aperintajn. La bitoloteko enhavas ankaŭ cent diskojn kaj sesmil broŝurojn. Aldone ĝi posedas arkivojn de UEA kaj TEJO kaj kolekton de manuskriptoj.

C1.- Internacia Esperanto-Muzeo, en Vieno, posedas entute deksep mil volumojn: librojn kaj binditajn periodaĵojn. Nuntempe ĝi ricevas proksimume ducent kvindek gazetojn kaj periodaĵojn. La muzeo ankaŭ posedas cent dudek ok gramofondiskojn, tridek unu sonbendojn kaj aldone tridek mil flugfoliojn. La kolekto enhavas arkivaĵojn de kongresoj kaj kunvenoj. Ni ankoraŭ menci tiujn ĉi erojn: sescent okdek du aŭtografojn, ducent sesdek muzikkajerojn, 7 filmojn, sep mil kvarcent fotojn, pli ol okmil gazeteltondaĵojn, trimil kvarcent vinjetojn,

sesdek afiŝojn kaj okcent sepdek muzeajn objektojn: inter ili troviĝas insignoj, bustoj, tabuloj, ktp.

A.- En Kortrijk, Belgio, la Esperanto-Fondaĵo de la Publika Biblioteko posedas ĉirkaŭ dumil kvincent librojn kaj ĉirkaŭ kvinmil volumojn da binditaj gazetoj. Ĝi ankaŭ posedas kolekton da broŝuroj, flugfolioj, ktp.

Cl.- En Szeged, Hungario, la biblioteko havas mil kvarcent volumojn da esperantaĵoj kaj dumil arkivaĵojn. Tre grava estas la fakto, ke la biblioteko posedas la heredaĵon de Julio Baghy. Laŭ la informoj el la Katalogo de la Hungarlanda Esperanto-Biblioteko, eldonita en 1967, ĉe la biblioteko oni povas legi 18 diversajn gazetojn.

A.- La biblioteko de la Universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto, posedas kvarcent volumojn en esperanto kaj trimil volumojn pri interlingvistiko.

C1.- Jen do, laŭ tiu ĉi dokumento de CED pri la esplorcentroj pri interlingvoj, kion oni povas scii, koncerne la materialon mem. Historiaj notoj ankaŭ havas grandan intereson.

A.- E1 ili ni lernas, ke S-ro Montagu Butler, kiu fariĝis sekretario de Brita Esperanto-Asocio en 1916, fondis la bibliotekon kiu portas lian nomon, en 1922 kaj prizorgis ĝin ĝis sia morto en 1970. Kiel parto de Brita Esperanto-Asocio, la biblioteko ne havas apartan buĝeton. Ĝi konsistas el unu ĉambro kaj flankĉambro de proksimume sesdek kvadrataj metroj.

Cl.- Ankaŭ la Biblioteko Hodler ne havas apartan buĝeton. Ĝi konsistas el tri ĉambroj, dudek sidlokoj kaj vastas sesdek unu kvadrat metrojn. Ĝi komencis sian vivon en 1908 per aĉeto fare de Hector Hodler de la biblioteko de Svisa Esperanto-Societo.

A.- la plej granda el la ses bibliotekoj, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, estis fondita en 1927 fare de Hugo Steiner. En 1929 ĝi integriĝis al la Aŭstria Nacia Biblioteko kiel "Speciala Kolekto". Dum la nazi-reĝimo (1938-1945) ĝi estis malpermesita kaj enpakita en kelo de la biblioteko. Ĝi instaliĝis en la nunaj ejoj en 1947. Buĝete la Internacia Esperanto-Muzeo dependas de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Ĝi konsistas el kvin ĉambroj, kiuj ampleksas cent sesdek kvadratajn metrojn. Du salajratoj laboras en tiu ĉi institucio, kie ekzistas sidlokoj por dudek personoj.

C1.- La Esperanto-Fondaĵo en Kortrijk kreiĝis en 1971. La fondinto kaj nun estro estas Cesar Vanbiervliet. La fondaĵo havas nek apartan buĝeton, nek apartan salonon.

A.- En Szeged la Hungarlanda Esperanto-Biblioteko malfermiĝis en 1960 en la kadro de la Biblioteko Somogyi. Laboras por ĝi unu salajrato.

C1.- Prizorgas la esperanto-bibliotekon de la Universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto profesoro István Szerdahelyi, kiu ekde 1967 respondecas pri la instruado de esperanto. Tiu ĉi arkivejo konsistas el unu ĉambro de dekkvar kvadratmetroj kaj ĝi havas sidlokojn por kvin personoj.

A.- Kiel vi konstatis, la CED-dokumentoj silentas pri la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri Lingvo Internacia (CDELI), kiu troviĝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds en Svislando kaj pri multaj aliaj gravaj esperanto-arkivejoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*